

En 1368 en Nankino (centroriento) estis fondita la dinastio Ming (1368-1644). Kiam la filo de ĝia fondinto (1360-1424) heredis la tronon, li komencis grandskalan konstruadon de muregoj kaj palacoj, kaj translokiĝis la ĉefurbon al Pekino en 1421. Dum lia regado, la ĉina floto plurfoje vizitis multajn sudorient-aziajn landojn, trairis la Hindan Oceanon, Persan Golfon kaj Maldivojn, kaj fine atingis Somalion kaj Kenjon de orienta Afriko. Tio estis la plej grandskala kaj plej longa aventura "antaŭkolumba" navigado.

En la posta periodo de la dinastio Ming, en la nordoriento de Ĉinio rapide kreskis la manĉura nacio; en 1644 ĝi fondis la dinastion Qing [ĉing] (1644-1911) kaj prenis Pekinon kiel ĉefurbon. La plej eminenta ĝia imperiestro Kangxi [kangŝji] (regis 1661-1722) reprenis Tajvanon kaj baris la invadon de la cara Rusio. Li fortigis la administradon super Tibeto kaj ellaboris serion de reguloj kaj sistemoj, laŭ kiu la centra registaro havis finan decidpovon en

nomumo de regantoj de Tibeto. Dum lia regperiodo la teritorio de Ĉinio areis 11 milionojn da kvadrataj kilometroj (nun 9,6 – Red.).

En 1840 eksplodis la Opia Milito inter Ĉinio kaj Britio, kun la rezulta venko de Britio. Ekde tiam la dinastio Qing dekadencis, kaj la ĉina socio degeneris en duonfeŭdisman kaj duonkolonian socion. En 1911 burĝara demokratia revolucio gvidata de Sun Jatsen renversis la regantan dinastion kaj metis finon al la feŭdisma monarkiismo, kiu daŭris pli ol 2000 jarojn en Ĉinio, kaj la historio de Ĉinio malfermis novan paĝon.

La redakcio de KONTAKTO kore dankas la redakcion de El Popola Ĉinio pro la afabla disponigo de tiu ĉi artikolo.

- (1) La centro de la dinastio estas la nuna okcidenta provinco Henan kaj la suda provinco Shanxi [ŝanŝji]; en ĝia influ-sfero siatempe estis la suda kaj norda bordoj de la Flava Rivero
- (2) fajenco – speco de argila tero, el kiu oni faras ceramikajojn
- (3) ĵakardo – mekanismo ebliganta la plej komplikajn plektojn en teksaĵoj



La Troja Milito: aliflanke de la mito

Olivier GAUDEFRROY, Francio

Ĉiuj ni pli-malpli konas la rakonton pri la Troja Milito dank'al la verkoj de Homero – *La Iliado* kaj *La Odiseado*. Laŭ tiuj ĉi verkoj, la milito inter la **helenoj** kaj la trojanoj okazis pro la forŝtelo de la bela Heleno, reĝino de Sparto, fare de la troja **princo** Pariso. Longan tempon oni opiniis, ke tiu milito estis nur elpensajo de Homero – li ja verkis pri tio, kio supozeble okazis antaŭ 450 jaroj! Sed la **arkeologiaj** esploroj sukcesis komence trovi la urbon Trojo, kaj la hodiaŭaj historiistoj konsentas, ke la urbo ja estis **siegita** kaj sendube prenita de la grekoj. La germana arkeologo Heinrich SCHLIEMANN* [hajnrin ŝliman] post 20 jaroj da elfosado (inter 1871 kaj 1890) trovis la urbon, kies **ruinoj** datiĝas de 3000 antaŭ Kristo ĝis 500 post Kristo. Tiu ĉi urbo situis en Anatolio, la nuna Turkio. Arkeologio pruvis la ekziston de naŭ urboj. Tiu, kiu interesas nin, estas la Trojo VII, la pli riĉa, pli mult-homa – la sama legenda Trojo, kiu malaperis en 1250 a.K. Kaj ĝuste en la Trojo VII oni malkovris post-signojn de gravaj detruoj kaj krome – armilojn, kapvestojn kaj ujojn similajn al tiuj de la homeraj tempoj! Tiel la **mito** fariĝis realo!

Trojo riĉiĝis pro tio, ke ĝi regis Dardanolojn (la mar-kolon inter la Marmora kaj Egea Maroj) – neces-

an vojon por la ŝipoj, kiuj navigis inter Mediteraneo kaj la Nigra Maro. Preni Trojon signifis eksplodigi tion, kio limigas la fluon de varoj. Verŝajne, tio malplaĉas al **romantikuloj**, sed la Troja milito havis ekonomiajn, kaj tute ne heroismajn kialojn... Arkeologiaj elfosadoj montris, ke la urbo estis ĉirkaŭita de muregoj – kaj tio klarigas, kial la milito daŭris longajn dek jarojn! La helenoj ne povis senigi Trojon je akvo, ĉar ene de ĝi estis multaj profundaj akvofontoj. Plie, dank'al siaj amikoj la urbo ricevadis necesajn manĝaĵojn. Do, la "forrabo" de la bela Heleno estis nur la **preteksto** por akiri la riĉaĵojn de la urbo kaj la regadon de la dardanelaj akvoj.

Kaj se la urbo estis tiel bone protektata, kio do kaŭzis ĝian falon? Ĉu vere ekzistis la fama ligna ĉevalo, elpensita de Uliso?... La respondo al tiu ĉi demando oni, verŝajne, neniam trovos. Sed kion oni ja scias, estas ke la trojanoj havis iaspecan **kulton** de ĉevalo. Ĉu Uliso uzis tiun kredon unue por konstruigi la ĉevalon, kaj poste por kredigi al la trojanoj, ke la helenoj foriris, lacaj pro la senfina milito? Povas esti, ke la helenoj kredigis al la trojanoj, ke ili lasis la lignan ĉevalon apud la marbordo kiel **oferon** al Pozidono, la dio de la oceano, por tiel havigi al si senprobleman revenon hejmen, dum efektive la ĉevalo kaŝis

en si la helenajn militistojn. La post-sekvoj estas konataj: la troja reĝo Priamo alportis la ĉevalon en la urbon, la helenoj nokte eliris el la ĉevalo kaj ruinigis Trojon. Tamen, oni povas kredi ankaŭ, ke la muregoj de Trojo falis pro **terremo**, kio ebligis al la helenoj eniri. Cetere, ĝuste ĉevalo estas la besto de Pozidono (laŭ la helenaj mitoj, Pozidono kreis ĝin!); krome, laŭ la helenaj kredoj, Pozidono respondecas ankaŭ pri la tertremoj!

* Germana arkeologo (1822-1890), kiu malkovris la ruinojn de Trojo. Kvankam bonŝanca, li tute ne estis profesia arkeologo, kaj pro tio oni multe **kritikis** lin: dum

la elfosadoj multo perdiĝis kaj ruinigis.

arkeologio (arkeologo) – scienco pri artoj de malnovaj tempoj

heleno – greko en malnovaj tempoj

kritiki – elmontri mankojn de io

kulto – sistemo de agoj por montri sian respekton al dio(j)

mito – fabelo, ofte bazita sur realo

ofero – donaco al di(a)oj

preteksto – ŝajna kialo, por kaŝi la veran

princo – filo de reĝo

romantikismo – literatura skolo de la 19-a j.c., en kiu sentoj ludis pli gravan rolon, ol faktoj

ruino – restaĵo (ekz., de urbo)

sieĝi – ĉirkaŭi (ekz., urbojn) kaj tiel senigi ĝin je akvo, manĝaĵoj ktp. por poste preni ĝin

terremo – fortaj moviĝoj de la tero

